

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

Gironumero 209354
Nederl.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0.80 GULDENO

ALIAJ LANDOJ:

20 Fr. Fr.; 0.70 Dol.; 2,1 Sv. Fr.

MONATA ORGANO

F. MEYER.

POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

POR PROGRESINTOJ.

Pseŭdo-Esperantistoj (1893).

De tempo al tempo ni ricevas de diversaj flankoj leterojn pli-malpli en la maniero de la sekvanta letero de s-ro N., kiu kuŝas nun antaŭ miaj okuloj:

Jam longe mi ne skribis al vi kaj vi kredeble jam pensas, ke mi, kiu iam estis varma amiko de la lingvo Esperanto, nun jam forgesis pri ĝi. Se vi tiel kredas, vi eraras. Mi ĉiam restos varmega amiko de Esperanto kaj mi neniam ĝin forgesos. Sed kiam mi komencis siatempe labori por Esperanto, mi renkontis tiom da mal-facilaĵoj, ke mi vole-ne vole devis lasi fali la manojn, kaj venis al la konvinko, ke nun la mondo ne ankoraŭ estas matura por tiu granda ideo. Sed estu tute certa, ke kiam la cirkonstancoj nur ŝanĝiĝos kaj la surdeco kaj indiferenteco de la mondo pasos, vi tuj vidos min en la vicoj de la plej energiaj batalantoj. Skribu al mi, kion nia afero faris de la tempo, kiam mi ĉesis esti aktiva Esperantisto; kiom da amikoj la afero nun havas? Kiaj novaj verkoj eliris? Se la „Esperantisto” ankoraŭ eliras, sendu al mi ian numeron de ĝi.

Entute estus bone, se vi de tempo al tempo sendus al mi ian novaĵon pri Esperanto, por ke mi ne tute forgesu pri ĝi . . . ktp.

Ne vere, kiam ni povos iam deviŝi la ŝviton de niaj fruntoj kaj, post la eternaj ĉagrenoj, malagrabraĵoj kaj moko, levi la kapon kaj rigardi kun plezuro la fruktojn de nia laborado, sinjoro N. tuj aliĝos al ni, kaj post la venko li fariĝos unu el la plej energiaj kunbatalantoj!!! Dume „la mondo ne ankoraŭ estas matura” kaj tial s-ro N. en tia grado ne povas esti aktiva Esperantisto”, ke li

ne povas eĉ . . . por sia propra persono aboni la „Esperantiston”, kiu „havas por li ĉiam grandan indon”.

Ne, sinjoroj pseŭdo-Esperantistoj! Estas vero, ke ĉia nova, utila ideo en la komenco devas tre malfacile batali kaj pli aŭ malpli frue ĝi venkos. Sed kiam dank’ al nia konstanteco la mondo fine ĉesos esti surda al niaj vortoj kaj nia afero ĉesos esti „fantazio, pri kiu la bona tempo postulas, ke oni ĝin moku, ne esplorinte ĝin”, kiam Esperanto estos ĉie akceptita kaj sankciita, - tiam ni vin ne bezonas, sinjoroj pseŭdo-Esperantistoj

Nekrologo pri Wasniewski (Lingvo Internacia 1897).

S-ro W. estis la ĉefa kaj plej laborema reprezentanto de nia afero en Varsovio kaj en Polujo. Li tradukis en lingvon polan la propagandan broŝureton kaj penadis ĉiam vastigadi ĝin kiel eble plej multe; li tradukis en lingvon polan ankaŭ la lernolibron n-ro 77, sed tiu ĉi traduko, pro manko de mono, bedaŭrinde ĝis nun ne povis esti eldonata. En la „Esperantisto” li kondukadis siatempe la rubrikon „El la mondo”. Sed lia ĉefa merito por nia afero konsistas en tio, ke li la unua komencis la tre gravajn „vojaĝojn inter-Esperantistajn”, kiuj poste trovis imitantojn kaj brilante montris al la mondo la grandan taŭgecon de nia lingvo por buŝaj komuniĝoj inter personoj de malsamaj landoj kaj nacioj. Tri fojojn li vizitis Svedujon, kie li uzadis la lingvon Esperanto kaj en la lasta tempo li vizitis Danujon, kiel ni vidas el lia letero en la januara numero de nia gazeto. En somero de 1896 li akceptis en Varsovio la Esperantistojn svedajn kaj servis al ili en tiu ĉi urbo kun la plej sincera amikeco. Li uzadis ĉian okazon, kiun li nur povis, por paroligadi pri nia afero la polajn gazetojn.

Saluton al via tombo, nia kara, tro frue mortinta amiko!

(1905) Pri la kongreso (lasta parto).

. . . En la fino mi permesas al mi, diri ankoraŭ kelkajn vortojn pri mia persona rilato al la kongreso. Mi scias, ke multaj Esperantistoj vidas en mi kvazaŭ la personiĝadon de nia afero kaj ili volas eble fari al mi en la kongreso iajn apartajn honorojn. Mi scias, ke la organizantoj de la kongreso volis enmeti en la programon specialan feston por mia honoro, ke unu Esperantisto verkis „himnon al Zamenhof” k.t.p. Mi kore petas ĉiujn, ke oni

tion ĉi ne faru, ĉar alie mi sentus min tre nebone. La kongreso devas honori nur la aferon, sed ne ian personon, ĉar alie la kongreso perdus tre multe de sia simpatieco, kaj tiu persono, al kiu oni per persona honorado volus fari agrablaĵon, havus nur malagrablaĵon.

Se la Esperantistoj opinias, ke ili devas esprimi al mi sian dankon, mi tiun ĉi dankon ja ricevus en alia maniero: kiam mi vidos grandan sukceson de tiu afero, al kiu mi dediĉis mian vivon, kiam centoj da kunbatalantaj amikoj premos al mi la manon kaj promesos al mi, ke ili neniam ĉesos laboradi por nia afero, tio ĉi estos por mi rekompenco tute sufiĉa kaj multe pli agrabla ol ĉiuj specialaj honoroj, kiujn oni volus fari al mi kaj kiuj nur venenus al mi la estadon en la kongreso.

NOTO. Ni tre konsilas al la legantoj, ne nur legi la artikolojn el „Originala Verkaro”, sed serioze pristudi ilin. Poste oni povas pritrakti ilin en la grupo. Tiel oni havos interesajn temojn en la grupkunvenoj kaj multaj homoj interkonatiĝos kun la verkaĵoj de d-ro Zamenhof.

La Vojo.

1
Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l'sorto, nek mokoĵ de l'
(homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

3
Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj per-
(diĝas -
Ni semas kaj semas konstante.
„Ho, ĉesu!” mokante la homoj
(admonas, -
„Ne ĉesu, ne ĉesu!” en kor' al ni sonas:
„Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos”.

2
Nur rekte, kuraĝe kaj neflankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapanta,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

4
Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

5
Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapanta,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.
El „Originala Verkaro” L. L. Zamenhof.

GRACO PRO PREĜO

(de d-ro Seiroku Honda)

La plej bela en la mondo estas la pura koro de senpekaj knabinoj. Kiam mi vidas figurojn de amindaj knabinoj, ankoraŭ nun klare reviviĝas en mia koro (kies aĝo jam transpasis sesdekon da jaroj) rememoro pri la junulaj tagoj, kiam mi lernis en la munĥena universitato, la rememoro, ke mi estis kortuŝita pro la pura koro de Lina, la 11-jara filino de la mastro de la pensiono, kie mi loĝis.

Neatenditaj vortoj.

Kvankam mi naskiĝis kiel filo de malriĉa terkulturisto en Saitama (gubernio en Japanujo) kaj de miaj knabaj tagoj lernis sub malfacilaj cirkonstancoj, mi ekstudis en Imperia Universitato en Germanujo kun la plano elstudi mian fakon en kvar jaroj. Sed mi plene konfuziĝis, kiam post duonjaro la cirkonstancoj ne plu permesis akiri la monsumon por fini mian studon. Tiom mi ekpenis por fini la studon en du jaroj, do en la duona tempo. Kaj post malpli ol du jaroj mi verkis la tezon kaj prezentis ĝin al komitato por universitata grado. Mi jam elaŭskultis ĉiujn lekcionojn, kiujn oni normale lernis en kvar jaroj. Kvankam la tezo feliĉe pasis en la ekzameno, mi ankaŭ parole devis ekzameniĝi, ĉar d-ro Preutano, profesoro de financa scienco, kontraŭstaris. Li diris: „Ĝis nun neniam okazis, ke la komitato donis universitan gradon al tiuj, kiuj lernis malpli ol du jarojn”.

„Nu, ankoraŭ iom pli da peno!” mi kriis kun firma decido.

Dum tri semajnoj mi lernis parkere la enhavon (231 paĝojn) de la lernolibro pri la financa scienco, verkita de d-ro Eheberg, kiun profesoro Preutano plej konfidis. Kaj mi ricevis universitatan gradon de „Doktoro de Nacia Ekonomia Scienco” post unu jaro kaj dek unu monatoj de kiam mi alvenis en Germanujon.

Post la solena festo pro universitata grado miaj amikoj ornamis min per multaj girlandoj kaj en duĉevala kaleŝo mi tre kontente revenis al mia pensiono. Ĝuste tiam revenis Lina kun sia tornistro el la popollernejo. Ŝia patrino aperis en la vestiblo por bonvenigi min kaj gaje ŝi diris al sia filineto: „Lina! Tuj gratulu s-ron Honda! Li gajnis gloran sukcecon! Vi”

Sed Lina respondis flegme: „Sed panjo, tio estas tute natura!”

Laŭ ŝia mieno oni pensus, ke nur realiĝis atendita afero. Mi konsterniĝis kaj dum momento rigardis la vizaĝon de Lina kun la penso: „Kia stranga knabino, kiu diras tian kuriozaĵon!”

Post momento ŝia patrino diris al mi kun rideto:

„S-ro Honda, bonvolu ne esti kolera. Verdire . . . Kvankam miaj filinetoj certe kredis en via sukceso, verŝajne tamen estis maltrankvilo en iliaj koroj. Ili interkonsiliĝis kaj de tiam ili ĉiumatene, survoje al la lernejo, vizitis preĝejon kaj tutkore preĝis por via sukceso. Lina firme kredas, ke, se oni petas al Dio, ĉiuj petoj plenumiĝas. Tial ŝi diris, ke via hodiaŭa sukceso estas tute natura. Ha, ha, ha”.

El miaj ambaŭ okuloj fluis varmaj gutoj kaj senĉese.

Por unu malriĉa, alilanda studento, kun kiu ili nur mallongan tempon loĝis sub la sama tegmento - jes! Ĉar mi estis malriĉa studento, tiuj ĉi tri germanaj fratinoj elkore preĝis por mia sukceso.

Ho, ne ekzistas landlimoj en homa amikeco. Tiam mi ja sentis, ke mia koro pleniĝas per ondoj de ĝojega kaj dankplena emocio multoble pli forta ol la sento, kun kiu mi ĵus revenis de la festo pro universitata grado.

Tradukis el la japana lingvo : Hiroshi H. Yamada.

Sopiro al printempo.

Froste kruela regas vintro nun,
Glacie brilas lago sub la lun'.
La birdoj suden flugis longe for -
Sopiras al printempo mia kor'.

Dum tra l' arbaro la ventega skurĝ'
Branĉegojn tordas per sovaĝa urĝ'
De l' tero alte for en la ĉiel'
Malvarme tremas ĉiu eta stel'.

Malhele griza regas vintro nun,
Nebuloj rampas sub la pala sun'.
Nur hejme ore brulas suna glor' -
Sopiras al printempo mia kor' !

Horfield, Bristol 7 (Angl.)

Stella Toogood.

La ideo, kion vi tuj komprenas, ĝenerale ne valoras, ke vi komprenas ĝin.

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”

— Kun neesprimebla ĝojo mi ricevis „La Juna Vivo” n-ro 6-7, en kiu mi legis, ke s-ro H. pagis por mi la abonon. Ni, latvaj esperantistoj, bone scias, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed granda ideo. Vivu Esperanto! . . .

Riga (Latvujo)

Voldemar Rozentals.

. . . Dum la pasintaj monatoj mi sufiĉe ofte faris filmprezentadojn en ĉi tiu urbo. Vendrede mi montros la Groet-filmon por la lasta fojo. Ĉi tiu vere estas mirakla filmo. Ĝi komunikas tiom da ĝojo dum ĉiu prezentado kaj ĉie la homoj diras: „Nu, kia bonega ideo aranĝi tiajn junularfestojn! Tiu ja estas la praktika solvo de la vojo al la fina paco inter la homoj”. Kaj ili pravas. Ĉiufoje, kiam okazas milito, la militestroj ĵuras, ke tio estas la lasta milito kaj tuj post la venko de ilia lando komenciĝos la paradiza vivo por la tuta homaro. Sed ni scias, ke ĉi tio estas nura parolado, kiu neniam efektiviĝos. Ni, membroj de T. J. O., scias la veron. Ni jam praktike solvis la problemon, kiu por la militestroj povas nur resti fantazio. La nuna milito forte helpas nian aferon. Ni do devas fari ĉion por daŭrigi kaj plivastigi nian laboron kaj tuj post la pacdeklaro ni ĝuos grandegan profiton, kiu ne estos persona profito, sed apartenos al la tuta homaro. Kiel eble plej multe ni aranĝu landajn junularfestojn kaj propagandu kiel neniam antaŭe, por ke ni venku kiel eble plej baldaŭ.

(Anglujo).

John W. Holland.

. . . Estante ĉi tie preskaŭ 3 jarojn ni nun ĝoje sciigas al vi, ke laŭ dekreto de la registaro baldaŭ multaj estos liberigataj. Do esperable proksiman fojon mi skribos al vi de mia hejmo.

Multaj salutoj al ceteraj geamikoj.

(Hispanujo)

Justo Estan.

(Autaŭ tri jaroj vi ankoraŭ ne estis matura por la Zamenhofismo. Espereble la vivo instruis al vi ankoraŭ pli multe da amo kaj kompreno. Tiam vi povos post via liberiĝo utiligi vian junan forton kaj energion por batali en la armeo de la veraj pacbatalantoj. - La petatajn librojn mi unu post la alia sendos al vi).

Korekto. Sur la antaŭa numero de »La Juna Vivo« erare staris: n-ro 8-9, januaro—februaro; tio devas esti: f e b r u a r o - m a r t o.

. . . Via laboro estas tre interesa kaj bonega, precipe tial, ĉar vi bazigas la movadon sur amo. - Kuraĝe laboru, la mondo bezonas novan spiriton.

Walter Kobelt, St. Margrethen (Svisujo).

. . . Kiom da malfeliĉaj aferoj okazis de post nia foriro el Tervuren! Nur du semajnojn post mia reiro mi devis iri en la armeon. De tiu tempo mi ĉiam laboris kun la kompanio en la franca regiono, kiun oni nomas „Alsace”. Mi neniam povis reiri hejmen krome dum dek tagoj kaj neniam revidis miajn kamaradojn. Ĝis nun la danĝeroj de la milito ne trafis min kaj mi forte esperas, ke tio daŭros.

Mi ricevis kaj legis atente la cirkuleron, kiun vi sendis pri „Tutmonda Movado”. Mi jam konis la celon de l'organizo, ĉar mi ĉeestis la kunsidon, kiu ĝin starigis. Mi estas absolute konvinkita pri la neceso kaj graveco de nova movado, bazita sur la Zamenhofa idealo. Jam en Tervuren mi diris tion al vi kaj promesis mian helpon. . . . Sed intertempe milito ekflamis; ĝi multe ŝanĝis mian vivon. Mi estas soldato, mia tempo ne apartenas al mi kaj mi loĝas en regiono, kies loĝantoj devis eĉ forlasi la hejmon; mi povas havi nenian kontakton kun miaj antaŭaj kamaradoj. - Tamen mi aliĝos al la movado. Mi ne povas doni gravan helpon dum la milito, sed tuj poste denove povos fervore labori!

Atendante ĝis kiam mi havos libertempon, mi legos, lernos kaj korespondos Esperante, por esti preta antaŭ la rekomenco de la paco.

Mi volas ankoraŭ diri al vi la neforgeseblan memoraĵon, kiun mi konservas pri la restado en Tervuren. Mi neniam vivis en tia agrabla internacia sfero. Mi pensas, ke nur tiuj kontaktoj inter alilandaj homoj povas elmontri la eblon de interfratiĝo de la homaro. En Tervuren mi konatiĝis kun alilandaj amikoj kaj amikinoj, pri kiuj mi ofte pensas dum tiuj mallumaj tagoj de la milito. - Tiu milito estas abomena afero, sed ĝi havos finon, eble ne tro malproksima . . . Mi tutkore esperas!

Ricevu, kara amikino, miajn tre korajn sentojn,

(Francujo)

J. Vuillemin.

Ĉiuj grandaj homoj estas fortaj en la venkado de malfacilaĵoj.



KORESPONDADO

S-ro S. en Bilbao (Port.): „Mi ŝatus, ke la „La Juna Vivo” denove farigu kiel en la komenco”.

Red.: „La Juna Vivo” havas la celon instrui al la junularo la idealon de d-ro Zamenhof. Por plenumi tiun taskon ĝi devas esti viva organismo, kiu senĉese renoviĝas. Alie „La Juna Vivo” ja ne plu estus „La Juna Vivo”.

S-ro S. en K. (Ned.) kaj s-ro F. en S. (Francujo) opinias, ke estus pli bone ne enpresigi legaĵon por la pli aĝa junularo. La lasta nur pensas pri diboĉado kaj sporto kaj estas vana laboro al ili instrui la Zamenhofismon.

Red.: Mi havas malan opinion. La cirkonstancoj estis treege malfavoraj al tiu generacio. Tuj kiam la tempo maturiĝos, ili formos la plej fortan kernon de nia movado.

S-ro K. en A. (Ned.) kaj s-ino S. en L. (Angl.) plendas, ke „L. J. V.” enhavas tro da materialo por la pli aĝa junularo. Ni atentos tiun konsilon kaj zorgos, ke oni en la rubriko por komencantoj trovos sufiĉe da legaĵo por pli junaj infanoj.

Ne eblas eldoni gazeton, kiu enhavas de la komenco ĝis la fino interesan materialon por ĉiuj homoj. Mi ricevas multajn revuojn kaj jam estas kontenta, se mi ĉiufoje trovas nur unu vere interesan artikolon. - Tamen, mi dankas por la atentigo kaj esperas, ke ankaŭ la aliaj legantoj ensendos siajn rimarkigojn.

S-ro F. en Bilbao (Port.) kaj s-ro R. en Riga (Latv.) petas enpresigi radio-rubrikon. - Ĉu inter la legantoj estas iu, kiu volas prizorgi du-monatan radio-rubrikon en „La Juna Vivo”? La red. donos unu paĝon por tiu celo.

Liano en Sl. (Ned.): Dankon pro viaj simplaj tradukoj. „Stranga Manĝaĵo” aperos en la venonta numero. „Duobla bonŝanco” ne plaĉas al mi. Mi preferas rakontojn pri ordinaraĵoj ol tiuj pri reĝoj kaj imperiestroj.

Por niaj izolitaj geamikoj. Denove ni povas ĝojigi kelkajn fidelajn legantojn: F-ino A. Spaans, Instruistino en Oosterend (Texel, Ned.), pagis por f-ino Olomouc, Tr. Svobody 4, Ĉeĥoslovakujo. S-ino Morris, 19 East 70 Str., New York, Usono, pagis por: H. Grosser, Weichselplatz 5, Berlin-Neukölln; Karl Vanselow, Winterfeldstr. 26, Berlin, W. 57, ambaŭ en Germanujo; Miguel Egido, Centre d'Herbergement, Lamotte-Beuvron (Loir-et-Cher, Francujo). S-ro Edwards, Spaardammerplantsoen 27, Amsterdam (Ned.), pagis por s-ro Montserrat, Provenza 75, Barcelona (Hisp.). La Esperanto-grupo »Nia Idealo« en Koedijk (Ned.) pagis por s-ro Otruba, Tesetice ĉe Olomouc (Protektorat Mähren) kaj por Frant. Patera, Klatovy (Stepanovice) 163/II (Protektorat Ĉeĥy.). S-ro Symes, Clifton House, Wigton (Angl.), pagis por Juan Bosces, 16 Hernan Cortes, Valencia (Hisp.), por f-ino Teresa Ferré, Carreterra de Montblanc 18, Alcover (Tarragona, Hisp.) kaj krome por juna skolto en Hungarujo, kun kiu li deziras korespondi.

(Daŭrigo sur paĝo 130)

Por komencantoj kaj junaj legantoj.

Letero de knabeto el Vieno.¹⁾

Karaj panjo kaj paĉjo.

Nun mi estas en Holando. Dum tri tagoj kaj du noktoj ni sidis en la vagonaro. Kaj de la stacidomo oni veturigis min per aŭtomobilo al la homoj, ĉe kiuj mi nun loĝas. Kaj kiam la fraŭlino, vi ja scias, kiu vojaĝis kun ni el Vieno, sonorigis, la pordo malfermiĝis, kaj la patro, kaj la patrino, kaj multaj infanoj venis por rigardi min. Kaj la patrino diris ion al mi, sed mi ne komprenis, ĉar ili parolas tie ĉi tiel strangan lingvon! Sed ŝi prenis mian manon kaj kondukis min al la ĉambro. Kaj tiam ŝi donis al mi glason da lakto kun panbiskvito. Tre bonguste! Kaj ĉiuj infanoj rigardis al mi. Tio ne estis agrabla. Sed la patrino forpelis ilin. Kaj kiam mi estis preta, ŝi kunprenis min al alia ĉambro, kaj tie staris granda kuvo kun varma akvo. Kaj ŝi ree diris ion, sed mi ne komprenis. Kaj tiam ŝi komencis senvestigi min. Jes, panjo, mi vere ne povis malhelpi. Vi ĉiam diris, ke mi ne rajtas rakonti al aliaj homoj, ke mi nur surhavas pantalonon kaj bluzon, kaj nun la sinjorino tamen vidis. Vere ne estas mia kulpo! Kaj tiam mi devis en la bankuvo, kaj la patrino tute lavis min, kaj ŝi metis multan sapon sur la spongon. Ŝi tute ne estis ŝparema je la sapo! Kaj multaj larmoj fluis laŭ ŝiaj vangoj. Ĉu ŝi bedaŭrus, ke ŝi havas min en sia domo? Sed ŝi ja ne devas havi min, ĉu panjo? Ŝi ja mem petis tion, ĉu ne? Tion vi ja diris. Kaj post kiam ŝi tute sekigis min, ŝi momenton forlasis la ĉambron, kaj revenis kun la patro. Kaj tiu rigardis al mi, kaj skuis sian kapon, kaj li karesis mian hararon, kaj ankaŭ diris ion. Ĉu ankaŭ li prefere malhavas min? Kaj tiam mi ree povis surmeti miajn vestojn, kaj vespere mi ricevis ankoraŭ bongustan buterpanon, kaj ankaŭ lakton. Kaj tiam la patrino portis min al la lito, kaj ŝi bone enŝtopis min, kaj kisis min. Tamen estas bonaj homoj, ĉu ankaŭ vi ne opinias, panjo? Sed mi estos tre obea, kaj ne manĝos tre multe, tiam ili certe ne baldaŭ forsendos min. Kaj mi nur tre malmulte ploris, ĉar mi devis dormi ĉe fremdaj homoj.

Multe, multe da kisetoj de via

Friĉjo.

1) Post la milito de 1914—1918 multaj infanoj el Aŭstrio kaj Hungario venis al Nederlando por tie iom refortiĝi post la suferoj. Red.

Homoj kaj bestoj.

Ju pli norda la lando, des pli solecaj la loĝantoj. Homoj, kiuj loĝas malproksime de la vivoplenaj regionoj, sentas sin forte interigitaj, kaj ili treege amas siajn dombestojn. Bela ekzemplo de tio estas la historio pri la lumturgardisto de la Faraaj insuloj.

Li havis polus-hundon, kaj kiam tiu besto malsaniĝis, li dum du tagoj vojaĝis tra neĝo kaj glacio, por serĉi besto-kuraciston.

„Mi donos al vi ĉion, kion mi posedas, se vi kuracos Polucon”, diris la viro. „Ĝi estas por mi frato kaj infano”.

Le bestkuracisto ne bezonis du tagojn por revojaĝi kun la lumturgardisto. Li ordonis, ke oni pretigu glitveturilon, kaj post dek du horoj ili atingis la lumturon. Sed — kiom grandega estis la ektimo — kaj samtempe la ĝojo — de la gardisto, kiam Poluco gaje saltis eksteren por saluti sian mastron. La brava viro tiom timis, ke li ne kuraĝis diri al la kuracisto, ke ĉi tiu hundo estas la sama besto, kiu antaŭ kelkaj tagoj tiel vomis kaj rifuzis ĉian nutraĵon.

„Nun tuj gvidu min al la malsana kvarpiedulo!” diris la kuracisto.

„Doktoro”, balbutis la gardisto. „Ĉi tiu hundo — estis malsana”.

La edzino klarigis la aferon. Apenaŭ ŝia edzo forestis, kiam Poluco eligis rubandan vermon kun la kapo de la bestaĉo.

„Ĉu vi estas certa pri tio?” demandis la kuracisto.

Ĝoje la edzino montris la vermon, kiun ŝi gardis en florpoto. Dume la lumturgardisto staris honteme flanke. Poste li diris: „Doktoro, mi tamen donos al vi, kion mi promesis. Edzino, bonvolu doni la kesteton, kiun ni gardas en la ŝranko apud la fajrejo”.

La edzino obeis. Ŝi malfermis la kesteton, kaj en ĝi kuŝis stango el pura oro.

„Mia posedaĵo, doktoro”. La lumturgardisto montris al la stango. Mia nevo estis orfosanto en Kalifornio. Li donacis ĝin al mi. Nun mi donacas ĝin al vi”.

Ridante la kuracisto skuis la kapon. „Via amo por la besto tuŝis min. La naturo helpis, antaŭ ol mi povis helpi. Se vi poste bezonos mian helpon, nur venigu min”.

Tiom longe ke ni ne sentas amon por ĉiu el niaj proksimuloj, ni ne komprenis la moralan leĝon. La plej alta moralo estas universa. Ĉiel ni klopodu dediĉe servi la mondon, memorante, ke ĉiu el niaj fratoj havas rajton je ni. Gandhi.

La ovo (rusa fabelo).

Iam estis viro. Li loĝis kun sia edzino en malgranda farmdomo en vilaĝo en Rusio. Tiuj bonaj homoj posedis kvar kokinojn, sed ne kokon, ĉar ili estis tre malriĉaj. Unu el la kokinoj estis ankoraŭ tre juna kaj ne-sperta. Kiam ĝi intencis produkti sian unuan ovon, ĝi volis meti tion en tre molan lokon, por ke ĝi ne rompiĝu. Fine ĝi metis ĝin sur la dorson de kato, kiu kuŝis en varma anguleto. La kato pro tio vekiĝis, malfermis la okulojn, ekstaris kaj streĉis la dorson. Pro tio la ovo falis kaj rompiĝis. La viro, kiu ĝuste envenis, vidis tion, kaj li tiom koleris, ke li piedbatis kruĉon, kiu staris apud li. La kruĉo falis kaj rompiĝis. La edzino aŭdis la bruon. Ŝi venis kaj insultis la edzon. Pro kolero ŝi rompis glason, kiun ŝi ĵus sekigis. En la apuda korto staris ĉe la puto la filinoj de la pastro. Ili aŭdis, ke la kruĉo kaj la glaso rompiĝas kaj ke la virino insultas la edzon. Ili tiom ektimis, ke unu el ili faligis la sitelon en la puton. Ili forkuris al la patrino. La patrino pro tio tre koleris. Ŝi volis kapti bastonon, kiu staris ĉe la forno. Sed tiam ŝi tuŝis la kaserolon kun supo, kiu staris sur la forno. La kaserolo falis, kaj ĉiu grasa supo fluis en la fornon.

La patro, kiu estis respektinda pastro, sidis en la ĝardeno kaj pensis. Subite li aŭdis la terurajn kriojn de la edzino kaj infanoj.

Li iris en la kuirejon kaj vidis fumon kaj flamojn. Li tuj elsaltis kaj forkuris al la preĝejo por sonorigi la brul-sonorilon. Ĉiuj farmistoj aŭdis tion, kaj alkuris kun edzinoj, infanoj kaj servistoj. Kaj kiam ili vidis, ke preskaŭ nenio okazis, ili ekkverelis, kaj poste eĉ interbatalis. Kiom da bruo! Kiom da kriado! Ili kulpigis unu la alian. — Kaj ĉio nur pro unu ovo!

Respondu al jenaj demandoj.

Kie loĝis la homoj? Kiaj ili estis? Kial ili ne posedis kokon? Kia estis unu el la kokinoj? Kion ĝi faris? Kie ĝi metis ovon? Kio okazis? Kial la viro estis kolera? Kion li faris? Kion faris la edzino? Kial ŝi koleris? Kiu estis en la apuda korto? Kial ili estis tie? Kial ili forkuris al la patrino? Kia estis la patrino? Kio okazis? Kie estis la patro? Kion li aŭdis? Kion li vidis? Kien iris la pastro? Kio okazis poste?

Kiu neniam ion volas, neniam ion komencas, neniam ion entreprenas, neniam peliĝas al celo, tiu ja neniam eraras, escepte — ke lia tuta vivo estas unu granda eraro.

La rano kaj la bovino.

Ranoj sidis sur herbejo kaj kvakis. Sur tiu herbejo estis ankaŭ bovino. Unu el la ranoj ekvidis la grandan beston. Subite ĝi pli laŭte kvakis. Ĝi enviis la bovinon, ĉar tiu estis granda. La rano plumblovis sin kaj demandis al la aliaj:

„Ĉu mi nun estas pli granda ol la bovino?”

„Ne”, ili respondis.

Ankoraŭ pli multe ĝi blovis kaj ree demandis:

„Kiu estas nun pli granda, ĝi aŭ mi?”

„La bovino”, diris la aliaj.

La rano ekkoleris, riskis lastan ŝancon . . . kaj krevis.

La kompatinda besto tuj mortis.

La „naŭvireto”.¹⁾

Karlo la kvina iam estis en Bruselo. Tiam venis al lia kortego viro, kiu aspektis tre malrice, sed parolis flue. Li deziris viziti la imperiestron. Komence oni malpermesis tion, sed la viro tiom insistis, ke li fine rajtis iri al la imperiestro.

Kiam li staris antaŭ la trono, li diris kun deca respekto:

„Mi venis ĉi tien kiel frato. Ĉar frato mi estas, pro niaj pragepatroj Adam kaj Eva. Kaj mi estas ĉi tie por peti almozon”.

Karlo ne volis ne rekompenci tian sen-timan agon kaj ordonis, ke oni donu al la petanto „naŭvireton”.

Tia donaco tamen nur malmulte kontentigis la viron. Kelkaj korteganoj vidis tion kaj, kiam la almozulo foriris, ili demandis, kial li aspektas tiel malkontente.

„Tiu monero ja estas tre malgranda donaco de tia granda sinjoro kaj frato”, li diris malgaje.

Oni raportis tion al la imperiestro. Li revenigis la viron. Ĉi tiu pensis, ke oni nun traktos lin pli bone. Sed la imperiestro diris ridete: „Iru ĉirkaŭ la mondo, kaj se ĉiuj fratoj faros al vi tian favoron, kian mi faris, vi estos pli riĉa ol mi!”

1) malgranda, antikva monero.

Kio estas „naŭvireto”? Kie iam estis Karlo la kvina? Kiu vizitis lin? Kiel la viro aspektis? Ĉu li flue povis paroli? Ĉu la viro tuj rajtis iri al la imperiestro? Kion li diris al la imperiestro? Kion li petis de la imperiestro? Ĉu Karlo donis ion al li? Ĉu la viro estis kontenta? Kial li ne estis kontenta? Ĉu la imperiestro revokis lin? Ĉu la almozulo tiam ricevis pli bonan donacon? Kion diris la imperiestro?

Ne tie.

Viro vundis sin je la kapo. Kamarado renkontis lin kaj diris: „Diru, Johano, ĉu vi vundis vin je la kapo?”

„Ne”, diris Johano, „mi vundis min je la kruro, sed la bandaĝo iomete ŝoviĝis”.

Distrita.

Profesoro Lesin estis tiom distrita, ke li foje eĉ frapis sur sian propran pardonon. La servisto rigardis el la fenestro, kaj en la mal-lumo li ne rekonis sian mastron.

„La profesoro ne estas hejme!” li kriis.

„Ho bone”, respondis la profesoro, „ne gravas. Mi poste revenos”.

Fremda.

Karlo, la bakisto, saltis el la lito. Tamen li estis ankoraŭ duondorma. Li rigardis el la fenestro, sed ne povis diveni, ĉu la krepusko anoncas la vesperon aŭ la matenon.

„Sinjoro!” li kriis al preteriranto, „ĉu vi povas diri al mi, ĉu tio estas la suno aŭ la luno?”

„Ne”, respondis la sinjoro. „Tion mi ne povas. Ankaŭ mi estas fremda tie ĉi”.

Punpago.

Ekscitita la promenantanto kuregis al la parkgardisto.

„Mi perdis en ĉi tiu parko du biletojn de dek guldenoj!” li spiregis. Kviete la gardisto prenis el sia poŝo libreton kaj krajonon.

„Vian nomon?” li petis.

„Ĉu vi kredas, ke mi rricevos ilin?” diris la promenantanto ĝoje.

„Tion mi ne scias”, estis la respondo, „sed vi devas punpagi pro la forĵeto de papero”.

Zorgemo.

Du rabistoj atendis kun revolveroj malantaŭ arbo. Ili sciis, ke pasos vojaĝisto, kiu portas multan monon.

Sed jam iĝis malfrue, kaj neniuj pasis. Maltrankvile flustris la unua fripono al la dua: „Espereble ne okazis al li akcidento...”

Ankaŭ la abeloj ventolas sian loĝejon.

En abelkorbo laboras diversaj specialistoj. Parto de la labor-abeloj estas masonistoj. Ili konstruas la vaks-ĉelojn. Alia parto funkcias kiel ĥemiistoj. Ili devas zorgi, ke la mielo fariĝas konservebla.

Kelkaj el la abeloj servas kiel entombigistoj. Tiuj eligas la malgrandajn kadavrojn de la bestoj el la korboj. La pli grandajn kadavrojn ili enbalzamigas, por ke tiuj ne putriĝu.

Sed ekzistas en la abelaro ankaŭ fakuloj por la aerum-instalaĵo.

Ili formas ĉenon, kiu pendas de la flugtruo ĝis profunde en la abelujo, kaj rekondukas al la flugtruo. Ĉi tiuj abeloj senĉese movas la flugilojn, per kio la aero en la abelujo refreŝiĝas.

(Germanio)

Frame.

Stuvenkamp kaj mi.

La husaroj staras en longa vico antaŭ la kampkuirejo. Tre longa, malgrasa, jam iom pli aĝa husaro tenas du sitelojn por manĝaĵo antaŭ la helpkuiristo. „Unu por Stuvenkamp kaj unu por mi”, li aldonas humile.

La kuiristo ĝisrande plenigas la sitelojn. „Por vi iom pli da supo certe estos utila!”, li diras bonhumora, kiam li rigardas la malgrasan figuron. „Ĉu via amiko estas ankaŭ tiom malgrasa?”

La longa husaro nur iom ridetas, kaj malaperas kun siaj du porcioj.

La sekvan tagon li denove venas kun du siteloj, kaj tiel ĉiutage. Kaj ĉiam li diras mallaŭte: Por Stuvenkamp kaj mi.

Tamen fine la kuiristo ekmiras pri tio, ke la longa husaro ĉiam devas alporti la supon por Stuvenkamp. Li diras: „Diru, ĉu vi ĉiam devas alporti la porcion por Stuvenkamp?”

„Jes, kaporalo”.

„Kaj kiu vi fakte estas?”

En la okuloj de la husaro venas tima esprimo.

„Mi estas Stuvenkamp”, li diras.

El „Haga Poŝto”.

Tasko.

1. Laŭtleĝu ĉiujn rakontojn en la rubriko por komencantoj.
2. Notu ĉiujn vortojn, kiujn vi ne konas, kaj poste lernu ilin.
3. Lernu parkere: „Ne tie”, „Distrita”, „Fremda”, „Punpago”, „Zorgemo”. „La rano kaj la bovino”.
4. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „Letero de knabeto el Vieno” kaj de „Homoj kaj bestoj”.

Tre simplaj ekcerzoj.

Kiel tri faras cent.

Du London-anoj vojaĝis al Irlando. Tie ili renkontis kamparanon, kiu plantis terpomojn. Ili komencis fari demandojn al li:

„Ĉu oni vizitas la lernejon en tiu ĉi sovaĝa lando?”

„Certe, sinjoro”, respondis la Irlandano.

„Ĉu vere? Kaj kion oni lernas tie? Ĉu vi lernis kalkuli?”

„Certe sinjoro”.

„Do, vi povas kalkuli, nu bone; kiom ni estas ĉi tie?”

„Ni estas kune cent, sinjoro”.

„Cent? Ha, ha, ni estas cent!” Kaj la du Londonanoj brue ridegis. Sed la Irlandano daŭrigis trankvile: „Mi volas tion al vi klarigi: jen estas mi, tio estas unu (1); plie estas vi, du nuloj (00), ĝuste tiel oni skribas 100, ĉu ne, sinjoroj?”

Kiuj vojaĝis al Irlando? Kio okazis al la du Londonanoj? Kion faris la kamparano? Ĉu la viroj parolis al li? Ĉu la Irlandano vizitis lernejon? Ĉu li lernis kalkuli? Kiel li superruzis la sinjorojn?

Vespera silento.

Mi sidas sola sub la lampo kaj aŭdas nur la venton ekstere tra la malfermita fenestro. Pacan melodion kantas hodiaŭ vespere la vento. En mia kapo zumas malnova melodio: Pri la paŝtisto sur la erikejo, sur la vasta, bela, riĉa erikejo. Kiom kontenta estis la paŝtisto! Ĉu vi ankoraŭ memoras el via lerneja tempo?

Miaj okuloj ripozas sur bela, blanka krizantemo, kiu ĝojigas mian koron. Kiom silente ĝi floras!

Ĉu ankaŭ al vi okazas en la nuna tempo, ke tia paca sento venas al vi en la koron? Nur pro la kvieta susurado de la vento, aŭ malnova melodio, aŭ bela floro?

De temp' al tempo oni ja devas silentigi en si la teran bruadon, kaj nur atenton doni al la eternaj belaĵoj.

Ludeto.

La gvidanto faras 10 diversajn movojn (agojn), ekz. ekstaras, turnas sin, oscedas, malfermas pordon, kantas ktp. Kiam li estas preta, la ludantoj notu la movojn (agojn) en la sama sinsenkvo, en kiu la gvidanto faris ilin. La plej kompleta listo gajnas.

Doktoro Zamenhof.

Vi lernas Esperanton. Kio ĝi estas? Ĝi estas artefarita lingvo. Kiu faris ĝin? Ĝi estas farita de doktoro Zamenhof. Li naskiĝis en la jaro 1859 en la urbo Bjellostok (Polio). Tiu urbo apartenis tiam al Rusio. Kaj nun ĝi ree apartenas al tiu lando. La loĝantaro konsistis el kvar nacioj: Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj.

La malamikaj rilatoj inter ili turmentis lian animon. Jam kiel infano li revis pri unu neŭtrala lingvo por la tuta homaro. Li volis enkonduki unu el la antikvaj lingvoj (latina aŭ greka), sed poste li komprenis, ke tio estas ne-ebla. Tiam li ekhavis la ideon pri artefarita lingvo. Post multa peno li sukcesis konstrui uzeblan lingvon. En la jaro 1887 li aperigis la unuan Esperanto-lernolibron en la rusa lingvo.

M. v. E.

Lernu la supran ekzercon parkere.

Albumoj.

La malnova albumo kuŝas nun sur la breto en la ŝranko kun vitraj pordoj. Antaŭ kelkaj jaroj la maljuna avino montris la enhavon de tiu libro al ĉiu, kiu vizitis ŝin en ŝia domo apud la parko. Tamen nun, post la morto de la kara virino, ŝiaj infanoj, jam patroj kaj patrinoj, ne trovis intereson en tiu malnova libro. Ĝia velura bindaĵo montras klarajn signojn de granda aĝo kaj malatento.

Tamen kio efektive estas en tiu albumo? Nur malfermu la paĝojn kaj rigardu la fotografaĵojn. Sur la unua paĝo estas fotografaĵo de la avino mem kun viro, la avo. Iliaj vestaĵoj kaŭzas ridojn nuntempe. Sur la dua paĝo estas bildo de la tuta familio: la avo staras malantaŭ la avino, iliaj sep infanoj staras aŭ sidas ĉirkaŭ la du maljunuloj. Denove la samaj malnovaj manieroj. Sur la tria paĝo ni vidas la bildon de bela hundo, granda, gracia, forta kaj inteligenta. Larĝa rubando ĉirkaŭas lian kolon. Antaŭ longe li mortis. Kaj tiel plu tra la tuta libro. La epoko, kiam estis popularaj tiaj albumoj, jam saĝne venis al fino. Malmultaj ili estas en la nunaj tagoj.

El „Brita Esperantisto”.

Se vi turnadas viajn okulojn al la flanko de la malbono, ŝajnas ke la malbono ĉie venkas, sed se vi lernas turni viajn okulojn al la simpla kaj la vero, tiam vi fine en ĉiuj aferoj nur vidus fortan kaj silentan venkon de tio, kion vi amas.

Nuntempa miraklo (treege grava afero).

Okazis nuntempa miraklo en Anglujo rilate al nia amiko John Holland. Laŭ sia konscienco li ne povas militservi kaj sekve ne povis ne rifuzi. La 20-an de marto li aperis antaŭ la tribunalo kaj la brita registaro ne trovis motivojn por puni lin kaj lasis lin tute libera. La granda vero de la Zamenhofa idealo, plene komprenita de John, savis lin el ĉiuj malfacilaĵoj. Mi kopias kelkajn partojn el la lastaj du leteroj, ricevitaj de li. En ĉi tiuj li pritraktas la maldungon el sia ofico pro la rifuzo.

Kara amikino,

25—3—1940.

La gelaboristoj de mia firmo sendis dokumenton al la estraro petante, ke oni eksigu min el la servo de la firmo. Ĉi tiun dokumenton subskribis 54 el la 86 gelaboristoj. La estraro renkontis la gelaboristojn en kunveno lastan sabaton kaj ankaŭ mi iris tien. La parolado estis sufiĉe akra kaj multaj faris neĝustajn asertojn pri mi, kiujn feliĉe mi povis rekte nei. La prezidanto de la firmo diris, ke la estraro ne vidis kaŭzon por eksigi min, kvankam la gelaboristoj tion petis. (Komence la gelaboristoj decidis fari strikon, se mi ne estus eksigata, sed poste decidis nur sendi la peton al la estraro.) Mi ne estas sola kontraŭ ĉiuj, ĉar mi havas du-tri geamikojn, kiuj subtenas mian vidpunkton, sed kompreneble la aliaj estas en la granda plimulto. Estas notinde, ke neniu el la oficistoj en mia propra oficejo subskribis la dokumenton.

La pasinta semajno estis por mi unu el la plej plenplenaj de okazintaĵoj en mia vivo. Mi vidas, ke la homoj ja tute ne komprenas, kaj mi nun eĉ pli ol iam scias, ke estas mia devo laboregi por la nuna generacio, por ke ili havu la ilon, per kiu ili povos kompreni. La homoj ja ne povas racie pensi en tia tempo, kia la nuna, kaj do ili faras agojn, kiujn ili tute ne farus en ordinara tempo. Pli ol iam ajn dum la lastaj tagoj mi konscias pri mia devo kaj mi provos kun ĉiuj miaj fortoj helpi en la grandega tasko, kiu estas farota, por ke ni atingu nian celon. Multaj nuntempe miras, ke mi ne sentas abomenon al tiuj, kiuj malnoble agas kontraŭ mi, sed mi tute ne sentas tiele. Mi nur estas iomete malfeliĉa, ke ili ne povas kompreni, sed mi ne deziras al iu malbonon pro la fakto, ke li faras agojn pro nekomprenemo. Al tiuj, kiuj rifuzas paroli al mi, mi ne povas multon fari, sed al aliaj mi parolas kaj ridetas kiel kutime kaj estas tute preta, tuj kiam la aliaj denove parolos, daŭre amikiĝi kun ili. Mi nun parolas eĉ al

tiuj, kiuj ne respondas. Tio laŭ mi estas la plej bona metodo por igi ilin denove „sanaj”.

Tuj kiam la aferoj estos fiksitaj mi skribos denove. Ĝis la!

John W. Holland.

Kara amikino,

27—3—1940.

Post la aperado de la anoncoj en la naciaj ĵurnaloj pri mia afero mi ricevis multajn leterojn kaj poŝtkartojn el ĉiuj landpartoj. El tiuj nur unu estis kontraŭe al mi; la ceteraj ĉiuj subtenis min kaj kuraĝigis per la nuraj sentoj esprimitaj. La ĉefdirektoro de mia firmo ankaŭ ricevis kelkajn kaj granda pakaĵo plena de folioj por disdonado al la gelaboristoj estis ricevita ĉe mia oficejo.

Mardvespere la estraro kunvenis kaj decidis, ke ĝi ne ŝanĝos sian opinion rilate al mia daŭra laborado por la firmo kaj ke ĝi ne vidis kaŭzon por mia eksigo. La laboristoj kunvenis kaj post akra diskutado fine akceptis la decidon de la estraro. Do, por la nuna momento la nuboj foriras el la ĉielo kaj nur restas la atendita malfavoro kaj tiel plu. Tion mi povas facile trapasi. Eĉ dum la plej akra periodo de la ĵus trapasinta malfacilaĵo mi ne sentis iun zorgon aŭ malkuraĝon, ĉar mi sciis, ke mi ne faris ion malĝustan, sed male batalis por la idealo kaj celo, al kiuj ni ĉiuj direktas niajn energiojn. Eĉ kiam mi staris meze en la kunveno de laboristoj kaj konsciis, ke ĉiuj estis kontraŭ mi, neniam mi sentis malkuraĝon aŭ pensis pri malsukceso. Mi ne fanfaronas pri tio, ĉar mi scias, ke dum la tuta tempo io alia min subtenis kaj ke mia personeco forfalis de mi - restis nur la idealo, kaj kio povas terenfaligi la idealon? Estas ja bonega sento, esti en la mezo de kontraŭuloj kaj ne senti malkuraĝon. La menso tre lerte kaptas ĉion kaj oni estas preta ridegi pro ĝojo. Sed tamen, - ke nur la kontraŭuloj povus *kompreni!*

Mia sperto estas bonega por mi. Neniam mi povus kompreni tiel bone la neceson de ĝusta edukado aŭ vidi tiel klare la gravecon kaj grandecon de la tasko antaŭ ni, se mi ne spertis la pasintan okazintaĵon. Kiel la milito detruas la racian penson! Mi nun scias, multe pli bone ol mi iam povus lerni el libroj, la vivlaboron, al kiu mi devas dediĉi mian tutan energion. La tasko estas giganta kaj do mi ne devas perdi minuton. Mi estas tuj preta ree labori

kiel antaŭe por T. J. O. kaj multe pli grandigi mian laboron tiurilate. Estas ege necese, ke la nuna generacio havu la ilon, per kiu ĝi povos kompreni.

Ĉiuj bondeziroj de

61, Vandijke Road

Leighton Buzzard, Beds. (Anglujo).

John W. Holland.

(Mi notas la adreson de John Holland kaj mi esperas, ke ĉiu leganto, kiu sentas la grandan signifon de ĉi tiu decido de la brita registaro, sendos sciigon al nia juna amiko. Bonvolu publikigi la leterojn kiom eble plej vaste).

INTERNACIA KONKURSO POR LA JUNULARO.

La Internacia Kristana Junulara Komisiono organizas la kvaran fojon internacian konkurson, dank' al s-ino Anna F. G. van Laon el Usono, kiu memore de sia edzo starigis fondaĵon por plivastigi la spiriton de internacia amikeco kaj kompreno inter la junularo.

En la kadro de la ĝenerala temo: „Kristo kaj la Universala Frateco” la konkurantoj devos pritrakti la temon jene: a) Gejunuletoj (Juniors): Komentarii „Miĥa”, ĉapitro 4 v. 1-5. b) Gejunuloj (Seniors): „Kiel rekonstrui mondon de fratamo, kie la milito estos forigita?”

Oni rekompencos la plej bonajn verkaĵojn per la sekvantaj premioj: a) Gejunuletoj (Juniors): 1 unu apremio de 300 svisaj frankoj. 1 dua premio de 250 svisaj frankoj. 2 triaj premioj po 200 svisaj frankoj. 8 kvinaj premioj de kuraĝigo po 50 svisaj frankoj. 50 honoraj medaloj.

b) Gejunuloj (Seniors): 1 unua premio de 300 svisaj frankoj. 1 dua premio de 250 svisaj frankoj. 2 triaj premioj po 200 svisaj frankoj. 2 kvaraj premioj po 100 svisaj frankoj. 7 kvinaj premioj de kuraĝigo po 50 svisaj frankoj. 10 abonoj al la „Ekumena Pres- kaj Inform-Servo”. 50 honoraj medaloj.

Krom tio la konkurantoj, kies verkaĵo akiros la mezvaloron, ricevos honoran mencion.

La Ekumena Junulara Komisiono (52 rue des Pâquis, Ĝenevo) sendos senpage laŭ peto la kompletan regularon de la konkurso en Esperanto.

PER LA KONKURSO AL NIA CELO.

La redakcio de „La Juna Vivo” zorgos dum la tuta jaro, ke la junaj legantoj ricevos taŭgan materialon, por ke ili faru bonegajn verkaĵojn pri la temoj de la konkurso.

Akrigu do viajn cerbojn, lernu logike pensi pri la problemoj kaj vi certe ricevos unu el la premioj; ankoraŭ multe pli grave estas, ke vi per ĉi tiu daŭra pensado iom post iom komprenos la grandan veron de la Zamenhofa idealo.

Veran pacon povas havi nur socia ordo bazita sur justo kaj egaleco.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

KOEDIJK [29 julio—5 aŭgusto]

Ĉar pro la militaj cirkonstancoj la nunjara T. J. O.-kunveno ne povos okazi en la centro de Nederlando, ni estis devigataj elekti alian lokon. Laŭ la opinio de la estraro, la plej bona loko estas la vilaĝo Koedijk en la provinco Nord-Holando. La koedijka T. J. O.-grupo decidis, post kelkaj esploroj, akcepti la T. J. O.-kongreson.

Kie situas Koedijk? Sur la bordo de la Granda Nord-Holanda Kanalo, tri kilometrojn norde de Alkmaar, kuŝas la ĉarma vilaĝo je la okcidenta limo de la „Regno de la mil insuloj”, famkonata en la fremdultrafiko!

Koedijk estas „brasik”-vilaĝo. Preskaŭ ĉiuj enloĝantoj kulturas brasikojn, ruĝajn, flavajn kaj danajn, terpomojn, fabojn kaj pizojn. Dum la lastaj jaroj ankaŭ la florbulo-kulturo kreskas.

La vilaĝo nur konsistas el unu vico de domoj. Tamen - tiu vico estas 5 kilometrojn longa!

La ventmontrilo sur la turo de la preĝejo estas ne koko, sed bovino! Koedijk . . . Bovin-digo . . . Pli tipa besto sur la turo ne estas trovebla, ĉu?

Malantaŭ la domoj la kampoj etendiĝas ĝis la horizonto. La laboristoj en la urboj ordinare iras bicikle al sia laboro, sed la terkulturistoj ĉi tie ne povas tion, ĉar la kampoj preskaŭ ĉiuj estas ĉirkaŭitaj de larĝaj fosoj. Tial ili uzas malgrandajn boatojn. Ŝarĝoĉarojn vi ne trovas en la vilaĝo, ĉar la rikolton oni transportas hejmen per grandaj pramoj. Dum la vintro oni konservas la brasikojn en la brasikejoj, kiuj en la somero estas malplenaj, sed ne en la venonta somero, ĉar tiam ni uzos kelkajn kiel dormejojn!!

Kiam ne plu estas aĉeteblaj aliaj freŝaj legomoj, oni per pramoj transportas la brasikojn al la granda vendejo en Broek-op-Langedijk. Ni intencas dum la T.J.O.-kunveno ankaŭ per pramoj viziti tiun vendejon.

Ĉiujn belajn lokojn en la ĉirkaŭaĵo ni povas atingi bicikle. Se vi do havos biciklon, kunportu ĝin, ĉar vi bezonos ĝin!! Imagu! Kun granda biciklo-karavano viziti Bergen-aan-Zee, Alkmaar k.t.p. Kia belega propagando por nia kara lingvo!! De - ne forgesu vian biciklon! (T.J.O. eldonos propran biciklo-flaĝeton por ornami niajn biciklojn). Plurajn detalojn pri la programo ni anoncos en la venonta numero de „La Juna Vivo” kaj en „La Peranto”.


Same kiel la antaŭajn fojojn, la kongreso daŭros 7 tagojn. Ni jam disponas pri belega salono kun granda scenejo. Grupoj, kiuj intencas partopreni, studu teatraĵetojn, dancojn, kantojn k.t.p. Sciigu al ni kiel eble plej baldaŭ kion vi prezentos. Eble ni tiam jam en la venonta numero povos anonci la plenan programon!

Por la kampadantoj ni jam luis kampadterenon, sed ili mem kunportu tendon!

Kvankam la prezoj de nutraĵoj k.t.p. plialtiĝis, ni denove fiksas la kotizon je 7 gld. Post la unua de julio la kotizo estos 7.50 gld. Post la 15-a de julio ni ne plu akceptos aliĝojn.

La administrado por la kongreso okazos nur en Koedijk. Aliĝu ĉe: s-ro H. J. Schut, Koedijk (N.H.). La kotizojn oni sendu ankaŭ al li (Poŝtĉekkonto: 310334).

Esperantistoj en Koedijk zorgu, ke el multaj domoj flirtos nia verda standardo!



komunikoj

Tutmonda Junularorganizo.

Adresoj:

Sekretario: S-ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto: S-ro M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam (Ĝiro 330139).

Filmservo: S-ro Schut, Koedijk (N.H., Ned.) Ĝiro 310334.

„ S-ro John Holland, 61 Vandyke Rd., Leighton-Buzzard (Beds, Angl.).
Red. „La Peranto” kaj „De Esperantist”: Meent 35, Leerdam, Ned.

T.J.O.-kunveno en Leeuwarden [Frislando]. — Jen la dua komuniko pri nia semajnfino [13-a kaj 14-a de julio 1940]:

Konciza programo: Sabatposttagmeze, je la 6.30-a ĝis la 10-a horo, festvespero. Dimanĉe, je la 8-a matene ĝis la 5-a horo posttagmeze, ekskurso per ŝipo sur la frisaj lagoj (vizito de vidindaĵoj). Komuna lunĉo je tagmezo.

Kotizo: Gld. 1,25 por la tuta semajnfino (la gepartoprenantoj ricevos trinkaĵon aŭ bongustaĵon dum la festvespero kaj lunĉon kun trinkaĵo sur la ŝipo). Aliĝojn ni notas post ricevo de la kotizo, kiun oni prefere pagu en la poŝtĉekkonton 62082 (J. Melis, Soendastr. 27, Leeuwarden).

Tranoktado: La red. de „L.J.V.” esperas, ke ankaŭ la legantoj de „La Juna Vivo” helpos gastigi niajn junajn Esperantistojn. Infanoj ne estas postulemaj; t. n. „Kermis”-lito sufiĉas. Se necece, ili kunportos dormsakon kun lankovrilo.

Informoj: Ĉiujn informojn donas f-ino E. van Wetering, T.J.O.-perantino, Schalk Burgerstr. 10, Leeuwarden. Tiuj, kiuj deziras prezenti teatraĵeton aŭ dancon dum la festvespero, bonvolu anonci tion kiel eble plej baldaŭ.

Aŭtobuso el Nord-Holando: Por la vojaĝo al Leeuwarden (kostoj tien kaj reen gld. 2,00) oni sin anoncu al f-ino Kool, West-Grafdijk (ĝiron-ro 382363).

Nia somera laboro. — Krom la granda T.J.O.-kunveno en Koedijk kaj la semajnfino en Frislando, ni organizas semajnfinojn en la junulardomoj en Bakkum (25, 26-5), en Petten (septembro) kaj en Assumburg (oktobro). La kostoj de tiuj kunvenoj estas gld. 0,55 (tranoktado kaj tri-foje teo; oni do kunportu buterpanojn). En ĉi tiuj kunvenoj ĉiuj Esperantistoj estos bonvenaj. Por Bakkum ni jam faris brilan programon, kiu aperos en „La Peranto” komence de majo. Anoncu vin por Bakkum antaŭ 15-5 kaj samtempe sendu vian aliĝmonon al f-ino Kool, West-Grafdijk.

„De Esperantist”. — La 5-a numero aperis kaj ĝia enhavo vere ree superas tiun de la antaŭaj n-roj. Ĝi enhavas i. a. interesan artikolon pri la nomo de d-ro Zamenhof, bonegan skizon pri la teruro de la milito, la kutimajn T.J.O.-informojn kaj Esperanto-lecionon. Pli ol iam „D. E.” meritas la atenton de niaj belgaj kaj nederlandaj membroj. La junulargrupoj en Bakkum, Koedijk, Limmen kaj West-Grafdijk vendis 400 ekz. en mallonga tempo. Infanoj ege ŝatas la kolportadon. Ili frue lernas labori por nia movado kaj samtempe vekas daŭran intereson por nia idealo ĉe la plenkreskuloj. Espereble la aliaj infangrupoj baldaŭ sekvos ĉi tiun ekzemplon.

„La Peranto” — En la komenco de majo aperos „La Peranto”. Bonvolu sendi sufiĉe frue viajn sciigojn al la redakcio.

Donaco — Nils Persson en Svedujo: 1 gld.

? E N I G M O J

1 2 3 4 5 6 La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:
 2 1. diablon; 2. akvo-beston; 3. trinkvazon;
 3 . . . 4. ludkarton kun nur unu punkto; 5. nomon de litero;
 4 . . 6. vokalon.

5 .

6

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn.
 Ni akceptos solvojn ĝis 1 junio.

La solvo el n-ro 8—9.

akra, polo, ungo, agfa, ardo, reto, osto, loto. La vorto estis: kongreso.
 La premiojn gajnis: P. Christensen en Kalundborg (Dan.) kaj J. Johnson en Stokholmo (Sved.)

Nia enigmo-stoko preskaŭ elĉerpiĝis. Kiu povas helpi ???

Ofte ne-esperantistoj diras al mi: „Kial la angla lingvo ne fariĝis la help-lingvo? Tiom multe da homoj ja parolas ĝin?”

Mi petas la legantaron de »La Juna Vivo« doni vastan kaj klaran respondon al tiu demando. — La red. denove donacos belan libron al tiu, kiu ensendis la plej bonan respondon.

Pro manko de spaco mi pritraktos la demandojn el la antaŭa numero de „La Juna Vivo” en la junia numero.

Por niaj izolitaj geamikoj (daŭrigo de paĝo 116). T.J.O.-grupo en Schoorl pagis por s-ro Wiesböck, Schaltendorf (Burgenland) kaj s-ro Sachse, Herrengasse 2/1, Klagenfurt. N.N. pagis por s-ro Feilbacher, St. Pölten, s-ro A. Pilz, Stubalpenstr. 35, Knittelfeld, Harro Linz (12-jara, tre bona Esperantisto), Uranusweg 19, Wien XIII. kaj s-ro Tröls, Leobnerstr. 2, Bruck a. d. Mur (ĉiuj en Germanujo, antaŭe Aŭstrujo). S-ro Walter Kobelt, Unterdorf, St. Margrethen (Svis.), donacis abonon al Vadim Gruščinskij, Nikolaev, Plechanovstr. No. 36, Sovetio (Ukraina). T.J.O.-grupo en Groet pagis por Nikolao Podzis Postiŝevo, Novo-Ekonomiĉeski rudnik, Nova kolonio 230-3, Ukraino-Donbas (U.S.S.R.) kaj J. Brukson, Leningrado-3, Poŝtkesto 492, Esperanto (U.S.S.R.).

Multan dankon pro via bona helpo. Espereble la sekvanta listo estos ankoraŭ multe pli longa, ĉar ankoraŭ multege da fidelaj abonantoj tute ne ricevas Esperantaĵojn. — La red. tre ŝatus, ke la samideanoj en Germanujo (antaŭe Aŭstrujo) sendu germanlingvan sciigon tuj post ricevo de la gazeto.



KORESPONDADROJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Anglujo: Douglas G. Lee, 19-jara, 142 Highbury, New Park, London N. 5, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Respondo certa.

Kiu instruisto deziras grup-korespondadon inter siaj kaj miaj klasanoj? S-ro H. Morcombe, 30 Beech Rd., Bourneville, Birmingham.

La klubanoj de knablerneja Esperantoklubo (12—14 jaraj) dez. kor. kun knaboj ĉiulandaj. Skribu amase al: H. C. Allen, Boy's School, Downham, Norfolk.

Brazilo: Diversaĝaj gekursanoj dez. kor. kun la tuta mondo per il. poŝtkartoj. S-ro Mario Rodriguez, Strato Ceneral Glizerio 357, Santo André (Ŝt. S. Paulo).

Ĉeĥoslovakujo: Mi volas koresp. (ne pri politiko) kaj intersanĝi poŝtmarkojn. Frant. Patera, Klatovy (Ŝtêpanovice) 163/II. Proktektorat Ĉeĥy.

Francujo: Komencanta fraŭlo, 22-jara, dez. kor. kun f-inoj en ĉiuj landoj. Resp. certa. Emile Lambinet, P 3, La Musse par Evreux (Eure).

Latvujo: 14/18-jaraj kursanoj dez. kor. k. ĉiulandaj gesperantistoj. Skribu al s-ro I. K. Grinbergs, J. K. B. Jura Alunana iela 7, Riga.

S-ro Voldemaro Rozentals, Andreju osta i-5, Riga, dez. kor.

Mikronezio: Gesamideanoj de Mikronezio dez. kor. kun tutmondaj gesamideanoj: Ŝ. Yasui, H. Oomura, E. Kojama, M. Oota, K. Sakurai, R. Niŝijima, M. Kauramoto, Y. Wada, E. Joŝioka, H. Ajukaŭa, N. Jamada, T. Margarita, N. Hamahata, T. Kurosaua, M. Ŝibahara, s-ino C. Kojama. - Skribu al prezidanto S. Kato, ANGAUR, Mikronezio.

Nederlando: S-ro W. A. v. Ooyen, Bergpolderstr. 18a, Rotterdam-N., dez. kor. per let. aŭ il.pk. kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

S-ro J. v. Wygerden, 18-jara, Loosdorp bij Leerdam, volas kor. kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Resp. certa.

Otto Honders, 17-jara lernanto radio-telegrafisto, Boëtinstraat, Leerdam, dez. kor. k. gejunuloj el ĉiuj landoj. Certe respondos.

Esperanto-grupo dez. kor. pri ĉiuj temoj, interŝ. poŝtmarkojn, il. poŝtkartojn, ktp. Sendu al: C. Salemink, Grebbestr. 32, Amersfoort.

Ied v. d. Hoogen, 19-jara, Prov. Ziekenhuis, Bakkum (N.H.), dez. kor. precipe kun skoltoj (pr. 23-jaraj).

S-ino Lette, Binckhorstl. 7, Hollandsche Rading, loĝanta en bela parto de Ned. (Gooi), serĉas junulinon, kiu volas senpage gastloĝi ĉe ŝi kelkan tempon, por konversacii en Esperanto.

Dora v. Zurk (15-jara knabino), Gabriël Metsusstr. 18, Huizum (Fr.), dez. kor. kun geknaboj el ĉiuj landoj.

Annie Kuperus (16-jara knabino), 6e Vegelindwarsstr. 1, Leeuwarden, dez. kor. kun geknaboj el ĉiuj landoj.

J. v. d. Struys, S. v. Gelderstr. 38, Velsen-N., dez. kor. letere kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

Miaj lernantinoj: Treesje de Nooy kaj Greta Duinker (12-jaraj) dez. kor. k. ĉ. l. adr.: Torenstr. 23, Castricum.

Floor Meydam, (20-jara), Lingestraat 11, Leerdam, dez. kor. k. ĉ. l.

La 12-an de majo '40
geedziĝos
EMILY KÜNZLER
kaj
WALTER KOBELT.
Unterdorf, St. Margrethen
Svisujo.

Naskiĝis:
„L E N Y”
filino de
H. J. SCHUT
kaj
L. SCHUT—HOF
Koedijk (Ned.), 1 April '40.

Ges-roj KOOPMANS—
NAUTA ĝoje sciigas pri la
naskiĝo de sia filino

Felicia Tine Johanna.
Amersfoort, 22 febr. '40.

Tutmonda Movado, la brila stelo
en la mallumega, militanta mondo.
Petu informojn al

s-ino E. v. VEENENDAAL—
BOUWES.

Limmen (N.H.), Nederlando.

Anoncetoj (30 c. por ĉiu linio).

„**NORDA STELO**”. Okaze de la kunveno en Schagen (N.H.), je 27 aprilo '40, veturos aŭtobuso, se eble de Purmerend al Schagen. La vojaĝkostoj estos pr. 80 c. sude de Alkmaro, kaj 60 c. de Alkmaro. Oni anoncu sin sufiĉe frue ĉe f-ino N. Kool, n-ro 112, West-Grafdijk (N.H.). Poŝtĉekkonto 382363.

Jarkotizo „La Juna Vivo”. Argentino: 2.20 kr.; Belgujo: 14 fr.; Britujo: 3 ŝ.; Ĉeĥoslovakujo: 17 kr.; Danujo: 3 kr.; Estonujo: 2,50 kr.; Finnlando: 25 m.; Francujo: 20 fr.; Italujo: 10 l.; Jugoslavujo: 25 din.; Maroko: 20 fr.; Norvegujo: 2,50 kr.; Polujo: 3,20 zl.; Portugalujo: 15 esk.; Svedujo: 2,30 kr.; Svisujo: 2,10 fr.; Usono: 0,70 dol. Oni povas pagi ankaŭ per 7 respondkuponoj. T. J. O.-anoj pagu 20% pli (aŭ 8 respondkuponojn).

PERANTOJ „LA JUNA VIVO”.

BELGUJO: S-ro H. Rainson, Hombeekschestw. 54, Mechelen, Poŝtĉ. 335183.

BRITUJO: Brita Esperanto-Asocio, Herongate, Rickmansworth, Herts.

ĈEĤOSLOVAKUJO: Ĉeĥosl. Esperanto-Asocio, Truhlarska 16, Praha II. Poŝtĉek. 12.371.

DANUJO: Dana Esperanto-Instituto (abonejo), Musikhuset, Nyköbing, F. S-ro Christensen, Frydenlundsvej 5, Skodsborg.

FRANCUJO: F-ino Lepachelet, 13 Place Victor Hugo, Somain (Nord), ĝiro-numero: Lille 72.36.

HUNGARUJO: Hungara Skolta Rondo E-ista, Nagy Sandor, U-6, Budapest V.

LATVUJO: F-ino L. Jevsejeva, Riga, Reformatoru 14/5.

MAROKO: S-ino I. Fink, 5 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca.

NORVEGUJO: Norvega Esperanto-Ligo, Skappelsgate 5, Hamar.

PORTUGALUJO: S-ro Santos Jr., Aljustrel, Alentejo.

SVEDUJO: Sveda Eldona Societo Esperanto, Box 698, Stokholm I.

SVISUJO: S-ro R. A. Dasen, St. Jean 17, Genève, ĝiro 1.6256.

USONO: Amerika Esperanto-Instituto, 1111 Brooke Rd., Rockford, Illinois.

Oni ankaŭ povas aboni „La Juna Vivo” pere de la poŝte en sia lando. En la nordaj landoj oni ankaŭ povas pagi per papermono en letero.